

FLANDRA



KATOLIKO

MAANDSCHRIFT VAN HET
KATHOLIEK VLAAMSCH ESPERANTO VERBOND

EDMOND PRIVAT

VIVO DE ZAMENHOF

Dua Eldono.

" Granda nombro da bildoj sur kreta papero. Fama verko de fama aŭtoro. Stilo ne atingita ĝis nun de alia verkisto, lego de iu ajn paĝo alportas plej altan ĝuon al ĉiu lingvoscianto. Resume: Fiero de nia literaturo. La libron bele ekipitan devus havi ĉiu Esperantisto, kion ebligas la relative tre malalta prezo "

Ligilo (Ĉeĥo-Slovakujo).

PREZOJ: bind. 29 fr. broŝ. 20 fr.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING CO., LTD.

Mendu ĉe

Katolika Esperanto Instituto a.s.p.c., Eg. Segerslaan 14, Wilrijk.

Poŝtĉekkonto n° 4549.84.

... Rookt ...
JAMAYCA
DE FYNSTE DER SIGAREN

Rijke keus in cigarillos
Sigarenfabrieken JAMAYCA, Arendonk
(oni korespondas en Esperanto)



ESPERANTISTOJ!
Ciam konsultu por viaj vojaĝoj
«Ultra Montes»
La plej belaj vojaĝoj je la
plej avantaĝaj kondiĉoj.

Ultra Montes, a. s. Antverpeno: 46
Korte Nieuwstr. Tel. 276.51 & 303.50.
Bruselo: Nieuwstr. 167. Tel. 17.53.44

FLANDRA UNUIĜO

DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ F. U. K. E.
Kath. Vlaamsch Esperanto Verbond K. V. E. V.
SEKCIO DE LA INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

Voorzitter: Lic. Leo Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst. **Ondervoorzitter:** Dr Marcel Naster, Naamsche straat 113, Leuven. **Proost:** E. H. A. Beckers, Professor, Normaalschool, Mechelen a. Maas. **Secretaris:** J. Van Deun, Turnhoutsche baan, 277, Borgerhout. **Kassier:** K. V. E. V. Aalst, P-konto 412.354.

Algemeen Bestuur: Kapitein P. Vangeel, Bonheiden.

Katholiek Esperanto Instituut, E. Segerslaan 14, Wilrijk. Postcheckrek. n° 4549.84.

PROVINCAJ KAJ LOKAJ DELEGITOJ:

Antwerpen

ANTWERPEN	E. Paesmans, Koepoortstraat, 64, P-konto 4145.89
BONHEIDEN	Kapitano P. Vangeel
BORNEM	A. De Ridder, Boschkant, 1
EDEGEM	R. Torfs, Verbindingsstraat, 9
EKEREN	Joz. Thijssens, Geesten, 72
GEEL	M. Gordon, kleermaker, Statiestraat, 3
HOBOKEN	J. De Groot, onderwijzer, Caronstraat, 31
MERKSEM	G. V. d. Bergh, onderwijzer, Tanghehoefstraat 2
MOL	F-ino M. Bergmans, Markt, 19
Ste MARIABURG	Joz. Cammaert, Van de Weygaardlei, 12, P-konto 4274.93
WILRIJK	D. Mortelmans, E. Segerslaan, 14

Brabant

GRIMBERGEN	E. H. Canisius van Hoogstraten, o. praem., abdij
LEUVEN	Petro De Fraye, Kapucienenvoer, 75, P-konto 4427.19

Limburg

BILZEN	K. Dubois, Brugstraat 26
HASSELT	A. Tournel, Guido Gezellestraat, 5
TONGEREN	Jos Smets-Box, Kielenstraat 74

Oost-Vlaanderen

GEERAARDSBERGEN	C. Bernaert, Pelgrimstraat, 1
GENT	M. De Valck, Meulestedesteenweg, 487

West-Vlaanderen

BLANKENBERGE	Fr. De Zutter, Wetstraat, 101
BRUGGE	F. Roose, G. Gezellelaan, 15
KORTRIJK	P. Mattelaer, apotheker, Voorstraat, 40
LEDEGEM	F-ino Quagebeur, Statiestraat, 39
LICHTERVELDE	Kam. Ferijn, Wetstaat, 47
OOSTENDE	Maurice Hessens, Blauw Kasteelstraat, 86
ROESELARE	H. Braekevelt, Statiedreef, 177
TIELT	J. Van Hautte, onderwijzer, Steenweg op Wakken

flandra  **katoliko**

Maandblad van het
Katholiek Vlaamsch
Esperanto-Verbond
K. V. E. V.

Monata Organo de
la Flandra Unuiĝo
Katolika Esperantista
F. U. K. E.

Redakcio: Patro C. v. Hoogstraten, O. Praem., Abatejo Grimbergen. (B)

Abonoprezio: 15 fr. Kun membreco FUKK kaj IKUE 20 fr. Abonoprezio por eksterlando 20 fr. P-konto 412.354 K.V.E.V. Aalst

LA TRI STANDARDOJ

KANTO DE LA FUKKANOJ.

Teksto: TYNEVERUM

Muziko: ARTHUR VERHOEVEN

Sekvas ni la *Kruestandardon*
De l' ĉiela Reĝo Krist',
Kaj direktas aman ardon
Ni konstante kun persist',
Al Jesuo, la Sinjoro,
Kaj al dolĉa Di-patrin'!
Katolikoj en la koro:
Ni elmontras tiaj nin!

Sekvas ni la *Stelstandardon*
De la Esperantistar',
Kaj certigas viglan gardon
Malgraŭ la « obstina bar' »!
Esperant' per Di-favoro
Vivu ĝis la monda fin'!
Esp(er)antistoj en la koro:
Ni elmontras tiaj nin!

Sekvas ni la *Leonstandardon*
De l' prăpatra kara land',
Streĉuzante nian hardon
Por Flandruj' kaj ĝia grand',
Kaj ni preĝas kun fervoro:
« Dio henu, regu ĝin! »
Flandroj veraj en la koro:
Ni elmontras tiaj nin!

Tri standardoj: *jen la celo:*
Tutanime agu ni
En la serv' de l' Verda Stelo,
Por la vera Eklezi',
Por la brila flandra gloro,
Por ke l' homoj amu sin!
Fukkeanoj en la koro:
Ni elmontras tiaj nin!

ONS BONDSLIED.

Hierboven eindelijk de tekst van ons nieuw bondslid: La Tri Standardoj. Het lied is een uiting van onze overtuiging als Katholiek, als Vlaming en als Esperantist en verklaart het doel van ons verbond: als Katholieken streven we ernaar Esperanto te gebruiken en te verspreiden ten bate van ons Heilig Geloof; als Vlamingen willen we Esperanto ten dienste stellen van

onze Vlaamsche kultuur, door ze in het buitenland naar vermogen bekend en bemind te maken, bovendien willen we door de verspreiding van Esperanto de menschen nader tot elkander brengen en het algemeen welzijn dienen overal waar het mogelijk is.

Twee vooroordeelen worden hier weerlegd; n.l. de meening als zou een Esperan-

tist geen vaderlandsliefde hebben en vervolgens de valsche opvatting als zouden wij Katholieke Esperantisten ons **slechts** bekommeren om Esperanto te gebruiken voor de Kerk. Het is deze laatste opvatting die de katholieke Esperantobeweging ten onrechte doet beschouwen als een « fakorganizo », zooals zijn de Esperantovereenigingen van onderwijzers, geneesheeren en dergelijke. In de katholieke Esperantobeweging vindt men alle goede doeleinden, die men in neutrale organisaties vindt en bovendien nog een bepaald en hooger doel meer, n.l. Esperanto ten dienste stellen van ons Ge-loof.

« Ni elmontras tiaj nin »; voor dit alles zullen we uitkomen.

Ons bondslied werd getoonzet door de

bekende componist Arthur Verhoeven. De volledige muziekguitgave (met pianobegeleiding en melodie) zal spoedig verschijnen. Ieder FUKÉ-lid zal zich een exemplaar aanschaffen om drie redenen: 1e om het lied zelf; 2e om ons verbond te steunen en 3e om ons verbond bekend te maken in zijn omgeving, door middel van de muziek van een gekend kunstenaar.

Het lied moet door iedereen gekend zijn vóór ons kongres, waar het zal klinken uit honderde monden bij de inhuldiging van onze vlag. Het worde ook gezongen « thuis en op de straat ».

Bestelt het reeds aanstonds op het Katholiek Esperanto Instituut, opdat we weten of de belangstelling groot genoeg is om het te laten drukken. De prijs zal zoo gering mogelijk zijn.

Katholiek ESPERANTISME

I. K. I. VIERT ZIJN EERSTE LUSTRUM.

Op 1 Juli a.s. zal het vijf jaren geleden zijn dat « Internacia Katolika Informejo » werd opgericht met het apostolisch doel, aan andersdenkenden de katholieke leer te doen kennen.

Nederig begonnen had IKI reeds spoedig succes.

Sinds 1938 wordt een degelijk opgesteld apologetisch blad uitgegeven « Vojo. Vero. Vivo » dat geregeld gratis aan niet-katholieken wordt toegezonden, maar waarop ook katholieken kunnen inschrijven als steun-abonnés tegen betaling van 13 fr. aan ondergeteekende of rechtstreeks aan de uitgever. (Adres: Eerw. frater Monulfus, directeur DeVliert 's Hertogenbosch, Nederland).

Benevens worden meermalen katholieke vlugschriften aan andersdenkenden thuisgestuurd.

Tot heden werd met 916 niet-katholieken briefwisseling onderhouden. Als men weet dat deze personen afkomstig zijn uit 49 landen heeft men tevens een treffend bewijs van het praktisch nut van Esperanto voor de verkondiging van ons heilig geloof.

Voor zoover het bekend is zijn reeds acht hiervan tot de Kerk bekeerd.

Mogen wij dan vandaag uit naam van alle Vlaamsche vrienden, de stoere werkers van IKI gelukwensen met het reeds bereikte resultaat en Gods rijksten zegen over hun arbeid afsmeeken?

Maar mogen wij tevens hun geldelijke moeilijkheden nog eens aan alle apostelzieder: aanbevelen?

A. van der Pluym
Kapelaan, Wandre.

Postcheckrekening n-ro 615.97.

N. B. — Wegens de geringe belangstelling die IKI geniet in Vlaanderen, moeten we veronderstellen dat onze leden niet genoeg het doel en de werking van IKI kennen. Daarom zullen we, wanneer de plaats het toelaat, een lang artikel laten verschijnen, dat volledig over IKI inlicht. N.v.d.R.

La Mondo forgesas la Infanon.

Oni ofte nomas la dudekan jarcenton, la jarcento de la infano. Eble estus pli bone kaj pli guste paroli pri la jarcento kontraŭ la infano, la jarcento de malkristanigo kaj de sencivilizo.

Kiel ajn nekredible: la infanon oni forgesas. Oni prizorgas la infanon rilate al nutrado, vestado kaj multaj aliaj efektive interesplenaj aferoj, sed oni forgesas ke ankaŭ la animo povas havi malsaton kaj malvarmon. La animo de multe da infanoj suferas kronikan anemion kaj arteriosklerozon.

Infanojn oni avertas, ke ili ne difektu la meblaron, ke ili, lavante al si la manojn, ne spruc-

makulu la murpaperon. Sed oni ne konscias ke la unlmvivo de la infano povas esti difektata aŭ sprucmakulata ĉiam kaj ĉie, kaj ke ĝi estu difektata aŭ sprucmakulata neniam. Oni forgesas la infanon.

Vere oni kelkfoje havas multan intereson por la infano.

Militistaj landoj faras el sep aŭ okjaraj knaboj, malgrandajn soldatojn (nur pensu pri la Hitler-junularo), aliaj faras el ili malgrandajn piedpilkundantojn, kantistojn, k. t. p. Komunumdekretoj protektas parkojn, placojn, k. t. p. kontraŭ difektado kaj detruemo. Tamen la infano iras tra stratoj kaj sur placoj, NEPROTEKTATA, kaj ĝi estas ĉirkaŭita ĉie (precipe en la grandurbo) de danĝero, precipe pri la animo. La strato estas skandalo por la infano, pro vestado, kinemo kaj aliaj malpli decaj reklamoj.

Oni forgesas la infanon.

Oni agas, parolas, eliras kaj estas enamiĝinta kvazaŭ la infano ne ekzistus. Oni forgesas aŭ ne sufiĉe konscias ke la infankaraktero por la daŭro de la tuta vivo povas sperti de ĝia ĉirkaŭaĵo la plej malprofitajn sekvojn. Poste oni havos malfacilajn, tute necedemajn, nefidindajn plenkreskul-karakterojn.

Daŭre memoru ĉiu, precipe tiu, kiu ofte kontaktas kun la junularo, la agitfrazon de la « LIGO SEN NOMO »:

RESPEKTU LA ĈASTECON DE LA INFANO.

Gepatroj deziras ĝuigi siajn infanojn en la freŝa naturo, kaj sendas ilin, sen kondukanto, al arbarhavaj kaj izolitaj lokoj, kie ili efektive povas plene ĝui kaj naive amuzi sin.

Tiuj gepatroj tamen forgesas denove, ke

ankaŭ tie kaj eĉ guste tie minacas granda danĝero por la infano. En la plej laŭlitera senco de la vorto oni rajtas diri, ke sole aŭ grupe ludantaj infanoj en la arbaroj estas insidataj kaj kaŝobservataj, ofte kun la plej tragediaj sekvoj. Kiam oni promenas tra la arbaroj, oni miregas pro la tiom ekscasaj troriskenoj kaj nepripensemo de tiom da gepatroj, kiuj siajn infanojn, interkiuj oni certe povas kalkuli la 14, 15 aŭ 16 jarulon, dum horoj, sen taŭga kondukanto, lasas vagi en kaj tra la arbaroj, koi, ne parolante pri la danĝero de iuj individuoj, jam estas tre malaprobinda.

Gepatroj apliku la konatan proverbon:
AVERTITA HOMO VALORAS DU.

La ĉefo de la Esperantofako ĉe la
« LIGO SEN NOMO. »

P. A. M. van Strien, Oosterhout, N.B.
Nederlando.

Kvankam la supra artikolo estas ekster la celo de nia organo, ni tamen volonte publikigas ĝin pro ĝia valoro, kaj ni eĉ konformigas ĝin al la celo de Flandra Katoliko per jena aldono:

Ni volas nun atentigi aniajn katolikajn Esperantistajn gepatrojn, ke ankaŭ estas danĝere, sendi siajn Esperantistajn infanojn al la tielnomitaj « Internaciaj Junular-Kunvenoj », kiuj estas organizataj por geknaboj de 12 ĝis 18 jaroj, kaj daŭras semajnon.

Ni opinias ke ne estas necese, klarigi la danĝeron, kiu estas en kelktaga kunvivado de ĝejnuloj de diversaj religioj aŭ plejparte sen religio, kaj sub la « neŭtrala » gvidado de senreligiuloj.

C. v. H.



XXIa I. K. U. E. - Kongreso

5-11 AŬG. ANTVERPENO 1939.

PLUJ INFORMOJ.

Grava manko.

Tiuj kiuj intencas partopreni al la kongreso bonvolu ne plu prokrasti anonci sin. Oni komprenu ke la kongres-komitato, pro diversaj motivoj, devas scii kiel eble plej frue la nombron de partoprenantoj. Estas ĉiam grava manko ĉe la katolikaj kongresoj, ke la partoprenantoj anoncas sin nur je la lasta momento. Tio estas tre malutila, ne nur por la aranĝado de la kongreso sed ankaŭ tial ke

multaj, vidante la malgrandan liston, pensas ke la kongreso malsukcesos kaj tial eble ne aliĝas, dum fakte la kongreso bone sukcesos kaj multnombro estos ĉeestata. Por « Nia XXIa » en Hago nur kelkaj dekoj anoncis sin en la unuaj monatoj, dum centoj aliĝis en la lastaj tagoj. Komprenu, ni petas, ke tiu sistemo ne helpas la sukceson de la kongreso. Estas do je via propra intereso tuj aliĝi. Kiuj aliĝas en la lasta momento ne povas ĝui la fervojan rabaton.

Loĝado.

La lokoj en la instituto por la loĝado de sinjoroj jam estas preskaŭ ĉiuj okupitaj. Ĉe manko de lokoj en la institutoj oni preferas akcepti tiujn kiuj loĝos dum la tuta kongreso. Pro la limigita loko oni anoncu sin tuj.

Bona novaĵo!

Ni povas informi pri jenaj *bonaj kaj malmultekostaj hoteloj*. Hotelo « Oude Toren », *Kompleta pensio* : 25 fr. (40 pers.) Hotelo « Metropole », *Kompleta pensio* : 25 fr. (20 pers.). Hotelo « Lederen Emmer » *Kompleta pensio* : 30 fr. (15 pers.)

Ĉiuj tiuj hoteloj situas en la ĉirkaŭaĵo de la Katedralo. Se oni ne deziras *kompletan pensio* (tranoktado, maten-, tag- kaj vespermanĝo) oni ne povas ĝui malaltan prezon.

Kiuj bonvolas?

Ni insiste petas niajn membrojn el Antverpeno kaj ĉirkaŭaĵo, ke ili laŭeble disponigu al almenaŭ unu persono lokon por loĝi en ilia domo. Ili ankaŭ klopodu trovi aliajn afablajn familiojn, kiuj bonvolas akcepti kongresanojn. Prefere oni akceptu senlaborulojn. Ili povas peti 10 fr. por nokte, matenmanĝon inkluzive.

Senlaboruloj.

La senlaboruloj (kiuj havigas ateston pri sia senlaboreco) ne nur ricevas kongreskarton por 4 fr. sed ankaŭ ĝuos 50 % da rabato de la loĝadkosto, ĝis kiam la helpkaso estas elĉerpita.

Helpkaso.

Tial ke jam multaj senlaboruloj anoncis sin, la helpkaso baldaŭ estos malplena. Ni bedaŭrus se ni devus malakcepti la senlaborulojn pro manko de mono. Niaj membroj, precipe tiuj kiuj mem ne povas ĉeesti la kongreson, tial bonvolu fari donacojn por la helpkaso.

Sekcikunvenoj.

En la kunveno por la sacerdotoj oni ekzamenos la eklezian vortaron, kiu jam grandparte estas pretigita de Patro D-ro Decoene.

Ankaŭ oni preparolos la eblecon kaj utilon de sacerdota sekcio en IKUE kun aparta internacia sacerdota revuo.



Vizitu LOVENON dum nia XXIa!

La Urbdomo en ogiva stilo estas vera puntaĵo el ŝtono, unu el la plej belaj arkitekturaĵoj en la mondo. Ĝi estis konstruata en la 15-a jarcento, de Mathieu de Layens. Interne ĝi vidiĝas rimarkindajn akcepteojn. La pompa gotika salono posedas 4 grandajn pentraĵojn, kiuj bildigas epizodojn el la historio de Loveno. La tre belaj fasadoj sur la Granda Placo, formas kun la ĉefpreĝejo de S-ta Petro kaj la novkonstruita ogiva juvelo, Nacia Banko, veran adekvatan kadron por la majstroverko de Mathieu de Layens.

Loveno. La URBDOMO.

Pri la sekcikunveno por la membroj de K. A. ŝajne ne ekzistas interesiĝo, ĉar ĝis nun ne envenis unu propono nek unu aliĝo kun indiko de membreco de K. A.

Ni esperas baldaŭ sperti interesiĝon pri tiu kunveno, tiel ke ni povos taŭge prepari ĝin.

Enskribo.

Ni nur enskribis definitive tiujn kongresanojn, kiuj jam pagis sian kotizon. La multaj kiuj, ne pagante, promesis veni, do ankoraŭ ne estas menciataj en la listo kaj ne ricevos sian kongreskarton.

Ekskursoj.

Alvenante en la akceptejon (Concordia, Lange Gasthuisstraat 30) la kongresanoj, sabaton kaj dimanĉon sciigu, al kiuj ekskursoj ili intencas partopreni, kaj samtempe pagi la prezon.

— La ekskurso al Luik kaj Remouchamps kostos ĉirkaŭe 40 fr., sen eniro en la ekspozicion kaj la grotojn, por kiuj ni tamen ricevos rabaton.

— London oni povos dum la libera vespero veturi vagonare en 15 minutoj al Mechelen, kie okazos sonorilarconcerto, al kiu venos centoj da eksterlandanoj (de la 8a - 9½a).

— Eble ne ĉiuj, kiuj partoprenos al la ekskurso al Brugge, ŝatas ĉeesti la faman Sankta-Sango-Ludon, kiu nur komenciĝos je la 9a kaj do finiĝos en la nokto. Se ilia nombro estas sufiĉa tiam aŭtobuso restos en Brugge por reporti ilin al Antverpeno. Se ilia nombro estas tro malgranda ili ĉiukaze povos reveturi al Antverpeno per trajno.

Zoologia ĝardeno.

La administracio de la fama Antverpena Zoologia ĝardeno konsentas doni al la Kongresanoj enirbileton por 6 fr. (anstataŭ 10 fr.) se ili estas minimume 30 personoj.

Literatura vespero.

Ni insiste petas la personojn, kiuj intencas partopreni al la literatura konkurso, tuj anonci sin al S-ro Vermuyten, Albertusstr. 16, Antwerpen.

Kongreslibro.

La enhavo, sub redaktado de s-ro Paesmans, estas jena :

Enkonduka vorto de S. Paesmans.
Aprobo de Sac. A. Beckers, rel. kons. de F.U.K.E.

Flandrujo vokas vin, de Lic. L. Calloens, prez. de F.U.K.E.

Diversaj artikoloj — multaj ilustraĵoj — ĉiuj sciindaĵoj por la kongresanoj.

Historio de F.U.K.E.

Kantoj.

Listo de la kongresanoj (kiuj ne aliĝas lastmomente) ktp.

Ŝanĝo en la programo.

Dimanĉon vespere anstataŭ teatraĵo okazos amuza vespero, dum kiu la « Kantanta promenadrondo Sta Norberto » kantos kaj la sonorilamuzikisto de Loveno, s-ro Bigelow, ludos sur la ĉambra sonorilaro.

Dankon.

Ni dankas la simpatian sekretarion de la Universala Kongreso en Bern, kiu bonvolas propagandi nian Kongreson inter la katolikaj partoprenantoj de la U. K.

Petu afiŝojn por pendigi ilin en publikaj lokoj.

Vraag de schoone groote aanplakbrieven en hangt die in publieke plaatsen, als kerken, winkels, pleinen, enz.

Waarom naar Antwerpen ?

Hebben onze leden er wel eens over nagedacht waarom het een moreele plicht is, voor ieder die het eenigszins kan, het XXIste IKUE-kongres te Antwerpen bij te wonen ?

Het is niet genoeg belang te stellen in de organisatie en het verloop van het Kongres, men moet ook naar best vermogen aan het welslagen ervan medewerken. En dat doet men natuurlijk op de eerste plaats door eraan deel te nemen, en wel om de volgende redenen :

Het Kongres trekt de aandacht van geheel Katholiek Vlaanderen op onze Katholieke Esperantobeweging, het is een manifestatie die onze beweging bekend en daarom ook bemind maakt. Vooral het feit, dat Zijne Eminentie Kardinaal Van Roey zelf komt pontifikaal assisteeren in de openingssmis en daarna de kongressisten toespreken, zal de oogen van velen openen.

En niet alleen trekt een IKUE-kongres de aandacht van het land waarin het plaats vindt maar ook van het buitenland, waar er over geschreven en gesproken wordt. Het is daarom van groot belang voor de

internationale Katholieke Esperanto-beweging, dat ons kongres zoo volmaakt mogelijk slaagt. De vooruitgang en het prestige van de beweging hangt ervan af. Ieder katholiek Esperantist, die het goed meent met de beweging, zal dan ook al het mogelijke doen eraan mede te werken en eraan deel te nemen, opdat het een WAARDIGE manifestatie wordt.

Het is echter ook in het belang van de leden zelf dat ze aan het kongres deelnemen. Velen hebben nooit de gelegenheid hun Esperantokennis in een gesprek met buitenlanders te toetsen. Hiervoor zijn de internationale kongressen uiterst geschikt. Men komt er in de praktijk van zijn idealen

La KANTANTA PROMENADRONDO de S-ta NORBERTO.

(kiu kantos dum la amuza vespero dimanĉon 6 Augusto.)

MALLONGA HISTORIA SKIZO.

La origino de la « Kantanta Promenadrondo » radikas en la flandra kulturbatalo, al kiu Rodenbach alvokis la studentojn. En 1913 kiam nia rondo estis fondita, la studentoj kaj profesoroj de la S-ta Norberto Instituto en Antverpeno, aktive partoprenis al ĉi tiu grandioza studentmovado.

Estis Lia Sacerdota Moŝto Th. Greeve, tiutempe seminariano, kiu en 1913, kune kun kelkaj el siaj amikoj fondis la promenadrondon, celante fariĝi el la anoj bonajn kantistojn, modelajn studentojn, sed samtempe fervoregajn kristanojn kaj konsciajn Flandrojn.

En 1917, Lia Sacerdota Moŝto Th. Greeve estis elektata kiel profesoro ĉe la S-ta Norberto-Instituto. De tiam la unuiĝo plivastigis rapide. La nombro de la anaro kreskis, la agado pliprofundigis, la novaj iniciativoj fariĝis pli multnombraj.

VIZITU LOVENON dum "Nia XXIa!"

La urbo Loveno (fl. Leuven, fr. Louvain), kiu situas apud la vojo de la granda internacia vagonarlinio Bruselo - Kolonjo, kaj estas en 1/2 horo atingebla el Bruselo, rekonstruiĝis nun komplete.

Kvankam la kvartaloj, detruitaj dum milito, estas antstataŭitaj per tute moderna bel-aspekta urbo kun larĝaj aleoj, borderitaj per imponaj privaaĵoj logejoj aŭ luksaj magazenoj, Loveno tamen prezentas ankoraŭ al la turistoj, amatoroj de pasinteco-poezio, la ĉarmon de siaj malnovaj stratetoj kun longaj kurboj, kie la sperta okulo malkovras ie

en wordt er nog meer overtuigd. De kongresdagen zijn ook onvergetelijk wegens de intieme gezelligheid die er heerscht op de feestavonden en bij de uitstappen. Een IKUE-kongres bijwonen is het grootste genot van een Katholiek Esperantist, een genot waarvoor men zich groote opofferingen getroosten kan.

FUKE-leden beschouwt het als uw plicht naar Antwerpen te komen en tevens ook als de nuttigste en aangenaamste vacantiereis die U doen kunt. Kunt U niet geheel het kongres bijwonen, komt dan voor één of twee dagen: U zult er nooit spijt van hebben!!!!

C. v. H.

En 1923-24 la Promenadrondo, kun certa kontenteco, povis supervidi sian dekjaran ekzistadon.

Krom la studenta sekcio, oni fondis en 1925 la eksstudentan sekcion. Ambaŭ kreskis frate kaj abunde, rigardante la komunan idealon. Oni tie kantis, sed ankaŭ ludis teatraĵojn, vojaĝis, ludbruis kaj pilkludis, kiel decas al Promenadrondanoj.

Baldaŭ la Rondo havis sian propran monatgazon: « Elgen Krabbels » (Propraj Literaĵoj).

La okazaĵoj postsekvis unu la alian en ne supervidebla vico: Diservoj (kelkaj en Armenia au Greka ritoj), Orspronvespero, Kantvespero, Jarfestoj kaj S-ta Ceciliafestoj. La Promenadrondo elkreskiĝis en fortan Unuiĝon, kiu en 1938 post dudek-kvinjara agado, povis fiere alrigardi la estonton kaj danki la Sinjoron pro la ebleco, kiun Li donis al ĝi plenumi tian belan laboron. Atestu tion la 490 anoj, kiujn ĝi konis, la 4755 reprezentadoj, la 5712 ripetadoj, la 315 ekskursoj kaj la 42 vojaĝoj.

Kun nova kuraĝo la Kantanta Promenadrondo ekiris al nova fruktdona periodo por la Dia Honoro kaj la utilo de Flandrujo.


Esperantigis: F-ino Magda De Rop.

kaj tie pentrindajn angulojn aŭ, inter verdaĵoj, antikvan memoraĵon de forflugintaj tempoj.

Iner la monumentoj kaj vidindaĵoj, kiuj meritas la specialan atenton de la vizitantoj, estas citinda: la Urbdomo.

Menciindaj ankaŭ estas:

La Muzeo Vanderkelen - Mertens (pentraĵoj, skulptaĵoj, medaloj) en la Savooistraat. La Muzeo de Spoelberg en la nova biblioteko de la Universitato, Volksplaats (Popola Placo). Ĝi enhavas kolekton da pentraĵoj, malnovajn meblojn, porcelanojn, armilojn k.t.p.



LOVENO. Kastelo « Arenberg », Heverlee.

ĉiuj intereseĝaj. Alirebla marde de la 9a ĝis tagmezo. Jaŭde, de la 2a ĝis la 4a dumvintre, de la 2a ĝis la 5a p.t. dumsomere.

La Kolegiala Preĝejo de Sta Petro, Granda Placo, impona monumento de la XVa jarcento, bruligita en 1914 de la germanoj, admirinde rekonstruita. Diservoj denove tie okazas.

La Preĝejo de Sta Gertruda, XVa jarcento, Half-Maartstraat, kun sia turo el blanka ardena gnejso, estas famkonata pro sia ligna skulptita ĥorejo, vera majstroverko laŭ la opinio de spertuloj.

La Preĝejo Sta Miĥaelo, Naamschestraat, el la XVIIIa Jarcento, en Jezuita stilo. Tre rimarkinda fasado.

La Haloj, Naamschestraat, el la XIVa Jarcento, iama Draphalo, disponigitaj por la Universitato ek de 1432. Tiu konstruaĵo, nuntempe renovigita, entenis la faman bibliotekon de la Universitato, detruitan en 1914.

La Nova Universitata Biblioteko, donaco de la Usonanoj, troviĝas sur la Popolplaco.

La Granda Beginejo, tre pentrinda, Schapenstraat (Safostrato).

La Parko, Tienschestraat. Muroj kaj turoj el la XIIa Jarcento.

Je distanco de dek minutoj de la urbo, troviĝas la famkonata Abatejo de Park (XIIa Jarcento), kiu oni povas viziti.

En la ĉirkaŭaĵo de la urbo: interesplenaj vidindaĵoj, arbaro kaj Kastelo de Heverlee,

La kastelo de la Princoj de Arenberg, en Heverlee, estis konstruata en la komenco de la XVI-a jarcento, de Vilhelmo de Croy, kiu tiam estis la instruanto de Imperiestro Karlo.

En la apudeco troviĝas la antikvaj konstruaĵoj de la Celestena monaĥejo.

Arbaro de Meerdaal, Dolĉa Akvo, k. t. p.

Estas en Loveno elektraj tramoj, teatroj, bankoj, monŝangejoj kaj industriaj institucioj, ĉi tiuj ĉefe apud la Kanalo, kiu komunikigas la urbon kun la Rupelo kaj la Skeldo.

Tradukis Lovenano L. C.

⌘ EN LA F.U.K.E.-FAMILIO ⌘

Naskiĝo. — Pet origina Esperantlingva karto ni informiĝis, ke la 30an de Majo naskiĝis al la Gesinjoroj Joz. Lernout - Julia Mahieu en Mortsel ses infano, kiu estis baptizata la 4an de junio sub la nomo Maria. La informa karto montris desegnitaj la Patrino kun siaj ses juveloj: Jan, Roza, Gusta, Leo, Leen kaj Maria. FUKE deziras al la bela familio ĉion bonon kaj ĉielan benon.

Por nia flago.

Antaŭa sumo:	fr. 419.00
Donaco F-ino B. el Veurne	10.00
Bumema	5.00
Ree Bumema	5.90
Ni ne povas kudri nek brodi por nia flago, des pli volonte donacas, 2 fraŭlinoj	20.00
Denove Bumema	1.60

Entute: fr. 461.50

XXXIa Universala Kongreso de Esperanto

BERN, 29-a julio — 5-a aŭgusto 1939.

Adreso por leteroj : 31a Universala Kongreso de Esperanto, Bern.

Kotizoj : sv. fr. 30.— (belgaj fr. 203). La edzo aŭ edzino de kongresano, same gejunuloj ne pli ol 20-jaroj pagas la duonon de tiuj ĉi sumoj.

Plej oportune vi pagas al nia poŝtĉeka konto III 11611, aŭ per monbiletoj aŭ al Volksbank Bern.

Aliĝiloj estas haveblaj ĉe la sekretario de KUKĖ.

Blinduloj kaj ties gvidantoj ek de la 1-a de aprilo pagos po 5 sv. fr. por esti kongresano. Ili devas sendi ateston ke ili estas blindaj, subskribitan aŭ de IEL delegito, aŭ de Blindula Instituto, aŭ de kuracisto.

Fakaj kunvenoj : Ĝis nun sin anoncis : Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt- kaj Telegraf-oficistoj.

Internacia Scienca Asocio Esperantista.
Kristana Esperantista Ligo Internacia. (protestanta).

Turista fako de Nederlanda Esperanto-Asocio « L.E.E.N. »

Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj.

Glumarkoj, bona propagandilo, 100 pecoj kostas sv. fr. 1.20 aŭ 4 respondkuponojn.

Donacoj helpas sukcesigi la kongreson, la organiza komitato antaŭdankas al donantoj.

Blindula kaso, helpu ebligi al blinduloj la kongresviziton, la komitato danke akceptas donacojn por tiu kaso.

Loĝado kaj manĝado : vidu la favorajn aranĝojn sur paĝo 3 de nia gazeto « Ni vokas vin », n-ro 2.

Skolta tendaro : En la 31a UK okazos ankaŭ la skolta tendaro 1939. Informojn petu de la fakdelegitino por skoltismo : F-ino G. Merz, Falkenweg 9, Bern.

Oficiala kongresgazeto estas « Ni vokas vin ». Ĉiu kongresano ĝin ricevas senpage. Antaŭvidataj estas ok numeroj, la lasta enhavas la raporton pri la kongreso.

Vizo : La loĝantoj de Belgujo ne bezonas vizon por eniri Svisujon.

Presaĵoj : disdonotaj en la kongresejo — en kongresaj kunvenoj devas esti aprobitaj de la kongresa komitato.

Kongreslibro : Pro tro granda pezo ĝi ne estas forsendota antaŭe al la kongresanoj. Ĉiuj necesaj informoj aperos en la antaŭkongresa numero de la kongresgazeto.

Definitiva Kongresprogramo.

VENDREDO, 29a de julio.

Malfermo de la kongresolicejo en la stacidomo.

SABATO, 29a de julio.

Akcepto en la stacidomo kaj gvidado al la loĝejo.

15.30 : Kunsido de IEL kaj LKK.

20.15 : **Granda Internacia Kostumbalo** en ĉiuj salonoj de la Kursaal.

DIMANĈO, 30a de julio.

10.00 : **Solena malfermo de la kongreso** en la granda salono de Kazino. (Detala programo sekvas).

14.30 : Ekskurso tra la Bern-Corniche.

15.00 : **Surmonta protestan diservota** sur Gurten. Ĉe malbona vetero komuna diservo en la (protestanta) katedralo.



LOVENO. Ĉefpreĝejo de S-ta Petro. (meza navo)

LUNDO, 31a de julio.

10.00 : **Laborkunsido de IEL.**

10.00 : Rondveturado tra Bern, aŭ gvidado en grupoj.

14.15 : Rondveturado tra Bern, aŭ gvidado en grupoj.

14.30 : Fakaj kunsidoj.

20.00 : **Festa prezentado de la « katedral-ludoj »** sub ĉiela prezentado.

MARDO, 1a de aŭgusto.

10.00 : **Laborkunsido de IEL.**

10.00 : Rondveturado tra Bern, aŭ gvidado en grupoj.

14.15 : Rondveturado tra Bern, aŭ gvidado en grupoj.

14.30 : Fakaj kunsidoj.

14.30 : **Lumbildparolado** pri la historio de Svislando kaj pri la nacia festo de la 1a de aŭgusto.

20.15 : Partoprenado ĉe la federacia fondfestoj, en grupoj.

MERKREDO, 2a de aŭgusto.

Tuttaga **ekskurso al Jungfraujoch**, kaj Kleine Scheidegg.

ĴAŬDO, 3a de aŭgusto.

10.00 : **Laborkunsido de IEL.**

10.00 : Rondveturado tra Bern, aŭ gvidado en grupoj.

14.15 : Rondveturado tra Bern, aŭ gvidado en grupoj.

Ekskursoj : Al Blausee (blua lago).

Al Schwarzsee (nigra lago)

20.30 : **Kongresbalo.** Dancvespero. (Detala programo sekvas).

VENDREDO, 4a de aŭgusto.

9.00 : Fakaj kunsidoj.

10.00 : Rondveturado tra Bern, aŭ gvidado en grupoj.

Ekskursoj : Niesen-veturado.

Chasseral (Jura).

Trans la Pillon-pasejo.

Trans la Jaun-pasejo.

Granda transalpa-veturado.

SABATO, 5a de aŭgusto.

9.30 : **Solena fermo de la kongreso** en la granda salono de Kazino.

14.00 : Gvidado tra la muzeoj.

Post la kongreso la katolikaj partoprenintoj vojaĝas al la XXIa Kongreso de IKUE.

A T E N T U -

En la kadro de la XXXIa Universala Kongreso ne okazos Katolikaj Diservoj, kiel evidentiĝas el la programo. La katolikaj partoprenantoj tial devas plenumi sian dimanĉan devon per la ordinaj Mesoj en la katolikaj preĝejoj.

En Bern estas nur kelkaj katolikaj preĝejoj. La paroĥestro de la ĉefpreĝejo, Heilige Dreifaltigkeitskirche, ĉe Kleine Schanze, kore invitas la katolikajn kongresanojn al sia preĝejo, kie la Sanktaj Mesoj okazos ĉiun horon de la 6a ĝis la 11a. La preĝejo ne estas malproksima de la Kongresejo.

Alia katolika preĝejo estas la Marienkirche en la Wilerstrasse.

Antverpeno

Fasado

de la

S-ta Karlo-Baromeo-

preĝejo.



Esperanto en Radio

REGULAJ ELSENDOJ.

Dimanĉe:

8.45 — 9.00: Rijsel (247 m.) Kurso aŭ prelego.
9.15 — 9.25: Kortrijk (204 m.) Kurso aŭ informoj.
22.40 — 23.00: Hilversum (K. R. O. 301 m.) Prelego aŭ informoj.

Lunde:

21.50 — 22.10: Roma 2 RO 6 (1961 m.) kaj 2 RO 9 (31.02), eventuale ankaŭ Roma II (245 m.) Politikaj informoj.
22.45 — 23.05: Paris (PTT, 431 m.) Vidu malsupre.

Marde:

22.00 — 22.10: Estonaj stacioj, Turi (410 m.); Tartu (579); Tallinn (229 m.) Esperantokroniko.

Merkrede:

18.15 — 18.30: Montpellier (224 m.) Kurso.

Ĵaŭde:

9.30 — 9.45: Paris (431 m.) Kurso.

Sabate:

18.40 — 19.00 Roma (245 m.); IRF (30.52) kaj 2 RO 9 (31.02). Turisma kroniko.

ALIAJ ELSENDOJ:

Merkrede 5 kaj 19 julio:

Bulgaraj stacioj: 253 m. kaj 35.4 m. Prelego.

Mardon 18 julio:

inter 7 kaj 7.30 h. vespere, Dublin (531 m.) Prelego dum 15 minutoj. Titolo: Tra la montoj (pri modernaj ŝoseoj al altaj niveloj).

Sabatojn 8 kaj 22 julio:

Loksbergen FUKÉ-elsendo.

ESPERANTO-PROGRAMO DE PARIS DUM JULIO.

3-7-39. — **Esperantista Kabareto** de Raym. Schwartz
10-7-39. — **La Marbordo en Provenco**, turisma prelego kun folkloraj kantoj de Jacques Manceau.

17-7-39. — **14a de julio 1789**; radio-parolado de André Remond kaj liaj kunlaborantoj en la diversaj kvartaloj de Paris dum la tago de la popolo en la fortikaĵo Bastille.

24-7-39. — **Nia Eŭropo**, Esperantista elvoko de niaj 7 lastaj Universalaj Kongresoj, de Pierre Petit.

31-7-39. — **Historio de Esperanto**, (2a parto). La Unua Kongreso de Bulonjo apud Maro (1905), radio-Elvoko de André Remond.

N. I. R. — BRUSELO.

Aŭskultu la 18a de julio je la 19.55 horo la elsendon de N. I. R. (Flandra), kiam Nia prezidanto, S-ro Calloens, parolos pri la kongreso de IKUE.

N. B. — La programo ne estas kompleta. Ni esperas tamen iom post iom povi publikigi pli multajn staciojn kaj detalojn.

Radiostacioj ekster Eŭropo ne estas menciataj.



DANKO

Dankon sendis al ni la Centa Organizaĵo de la Skoltoj, pro nia donaco de 25 fr., senditaj dum la propagandaj tagoj de Aprilo.

NOVA SERVO.

Por havigi al naj sekcioj kaj izolaj membroj interesplenan legaĵon ni ek de nun kolektos la sekvantajn revuojn kaj eldonaĵojn kies numeroj aperis de pli ol 3 monatoj. Oni prunteprenu ilin al nia sekretario, J. Van Deun, Turnhoutschebaan 277, Borgerhout.

Jen listo de la haveblaj revuoj, kiun ni kompletigos laŭeble; Vojo — Vivo. Heroldo de Esperanto. Esperanto Internacia. Nederlanda katoliko. Katolika Vivo (1932) k. t. pl.

